tempo

Gazeto de Kroata Esperanto-Ligo
Časopis Hrvatskog saveza za esperanto

decembro 2005



- ★ Urbestro de Zagrebo Milan Bandić kunfestis Zamenhof-Tagon
- ★ Fragmento el *Hlapić* aperis per Esperanto bengale en Kalkato
- ★ Kroata Turisma Asocio reklamas sin per Universala Kongreso de Esperanto
- ★ Esperanta poeto Božidar Vančik ricevis sian straton en Varaždin
- ★ Kvar televidaj elsendoj pri Esperanto en decembro lige al Zamenhof-tago
- ★ Kroata karavano al Florenco ekprepariĝas

Karaj legantoj!

Zagrebaj esperantistoj festis la ĉi-jaran Zamenhof-tagon kun la zagreba urbestro Milan Bandić, kiu aliĝis al la publiko dum la prezento de la libro *Zamenhof-Strato* de Roman Dobrzynski. En la festo ne mankis eĉ ministro-konsilanto Piotr Malinowski de la pola ambasadejo en Kroatio.

Esperanto-Societo *Liberiga Stelo* en Osijek regalis siajn membrojn kaj osijekanojn okaze de Zamenhof-Tago per bela koncerto de kanzonistinoj Lada Kos kaj Lela Margitić.

Realiĝis kvar televidaj elsendoj pri la du Esperanto-eventoj en Zagrebo kaj Osijek!

La titolpaĝon ornamas la bengala revuo *Samidat* en kiu aperis la unua ĉapitro de la bengala traduko de *Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić*.

Kroatio en urbo Varaždin havas straton dediĉitan al grava kroata Esperanta tradukisto kaj poeto Božidar Vančik,

Kroata Turisma Asocio uzas foton pri Universala Kongreso de Esperanto en Zagrebo por reklami pri la kongresaj eblecoj de Kroatio.

La ĉefdelegito por Kroatio daŭre serĉata! (Intertempe, se iu bezonas ion pagi al Universala Esperanto-Asocio, bonvolu provizore uzi la adreson de Spomenka Štimec per Kroata Esperanto-Ligo, Kneza Mislava 11, tel. 4617550)

Komenciĝas preparoj por la kroata karavano al Florenco, kiun preparas Faruk Islamović

Ni resumas la duonjarcentan eldonagadon de Kroata Esperanto-Ligo per publikigo de la titolpaĝoj de la eldonitaj libroj tra kvin jardekoj.

Jen decembraj resumoj kiuj kronas la jaron 2005.

Kun Kristnaskaj bondeziroj *Tempo* publikigas poemon de Imre Szabo.

Bonvenon al la jaro 2006! Estu ĝi al ni ĉiuj bona!

S. Štimec

Sur la foto de Vlado Jurković la urbestro Milan Bandić kun vicprezidanto de KEL Radenko Milošević.

Baldaŭ Kristnasko!

Baldaŭ Kristnasko!
Ni devus ekvoji,
ĉar la infano
nepras naskiĝi!

Reĝoj Tri jam survojas,
do, eku ankaŭ ni!
Stelo zumas ekscitite,
la krimema mondo sin kaŝas.

Lucernas la kredo:
nepre naskiĝos tiu infano!

Do, ni eku!

Imre Szabó

Tempo

Fondita en 1980. Ne aperis en militaj jaroj 1993 kaj 1994. Aperas laŭeble kvarfoje jare - Jaro XXIV, numero 4/2005, ISSN 0352-1583. Tiu ĉi numero estas eldonita per financa helpo de Ministerio pri kulturo de Respubliko Kroatio.
Redakcio: Kneza Mislava 11/III, HR-10000 Zagreb, Kroatio, **tel:** (385 1) 4617550, **fakso** (385 1) 4619373, **rete**: esperanto@zg.t-com.hr, **www.esperanto.hr - Kontribuis**: Darko Blažić, Dalibor Brozović, Boris Ćović, Mina Dan, Probal Dašgupta, Arghyakusam Dattagupta, Danijela Drakula, Emil Hrvatin, Faruk Islamović, Vlado Jurković, Antun Kovač, Davor Klobučar, Dinko Matković, Damir Mikuličić, Radenko Milošević, Vjekoslav Morankić, Josip Pleadin, Judita Rey-Hudeček, Stanko Rukelj, Vanja Radovanović, Imre Szabó, Spomenka Štimec, Zlatko Tišljar. **Redaktis:** Spomenka Štimec, **Grafike aranĝis:** Josip Pleadin. **Presis:** Grafokom, Đurđevac, grafokom@kc.htnet.hr
Anonctarifo 1/1 paĝo 1000 kn (135 EUR) 1/2 paĝo 500 kn (68 EUR), lasta kovrilpaĝo 2.500 kn (328 EUR). **Abono**: 4 numeroj jare 40 kn (9,5 EUR), unuopa numero 10 kn (1,5 EUR)
La redakcio ne respondecas pri la opinioj en la subskribitaj tekstoj.

ZAMENHOF-TAGO 2005 EN KROATIO

La urbestro Milan Bandić inter la zagrebaj esperantistoj dum la libropezento (Fotis: Vlado Jurković)

Festo de la libro Zamenhof-Strato en Zagrebo

Zagreba urbestro Milan Bandić la 7-an de decembro partoprenis en la ĉi-jara Esperanto-Tago de Zagrebo okazigita de Kroata Esperanto-Ligo en unu el la plej grandaj zagrebaj librovendejoj *Profil-Megastore.* La urbestron akompanis estro de zagreba Oficejo por kulturo, klerigo kaj sporto Pavle Kalinić. La urbestro alvenis post la ricevo de invitilo kaj la libro *Zamenhof-Strato* de Roman Dobrzynski. (En la invitilo ni informis la urbestron, ke unu el zagrebaj stratoj portas la nomon de Zamenhof.)

Oficejo de ĉefministro de Kroatio Ivo Sanader skribe dankis pro sia ekzemplero de *Zamenhof-Strato,* samkiel la oficejo de ministro pri scienco, klerigo kaj sporto Dragan Primorac.

Ĉirkaŭ 60 personoj ĉeestis la programon.

Dum la aranĝo estis ekspoziciitaj la Esperanta, pola, litova, ĉeha, kroata kaj japana libroj *Zamenhof-Strato.* La baldaŭa apero de la slovena kaj la slovakaj eldonoj estis anoncitaj. Oni atendas ankaŭ la aperon de la surbendigita versio de kroata traduko de *Zamenhof-Strato,* kiun en 2006 laŭ iniciato de Kroata unuiĝo de nevidantaj esperantistoj preparas Biblioteko de blindaj kaj nevidantaj personoj. Eldonisto Damir Mikuličić parolis pri la kialoj de la eldono de la libro en la kroata, tradukisto Domagoj Vidović parolis pri la kondiĉoj en kiuj li kroatigis la verkon. Vida Jerman voĉlegis plurajn ĉapitrojn el la verko. La programon gvidis Spomenka Štimec.

Reprezentanto de la Pola Ambasadejo en Zagrebo, ministro-konsilanto Piotr Malinowski ricevis donace polan ekzempleron de la verko por la biblioteko de Pola Ambasadejo en Zagrebo.

Radio-programo informis pri la evento, redakcio pri kulturo de la kroata televido elsendis programon pri la libro. Alia redakcio inspirita pri la verko preparas apartan elsendon pri Zamenhof-Strato en Zagrebo.

Esperantistoj de Esperanto-Societo *Bude Borjan* el Zagrebo en la semajnoj antaŭ Zamenhof-Tago klopodis atentigi siajn samurbanojn pri la apero de Zamenhof-Strato per la organizita aĉeto de la libro en pluraj publikaj librovendejoj. Niaj klopodoj ne restis sen eĥo: la 22-an de novembro gazeto *Večernji list* publikigis informon pri la kvin plej aĉetataj libroj en Librovendejo AGM: *Zamenhof-Strato* en tiu listo staras sur la kvara loko kaj Roman Dobrzynski estas akompanata de aŭtoroj Engdahl/William, Krauss Lawrence, Melissa P. kaj H. Eberle.

S.Štimec

Pola ministro-konsilanto Piotr Malinowski, reprezentanto de la Pola Ambasadejo en Zagrebo ĉeestis la libroprezenton.

Zamenhof-Tago en Varaždin

Esperanto-Societo BožidarVančik el Varaždin okazigis lige al Zamenhof-Tago 2006 sian Jarkunvenon. La prezidanto de la societo Stanko Rukelj aperigis en la retejo de la societo la unuan romanon tradukita de la kroata en Esperanton, *La trezoro de l' orafisto* de August Šenoa el 1911, tradukita de Fran Kolar Krom. Jam antaŭe estis enretigitaj (lingve reviziitaj de Franko Luin *Surprizitaj nuptofestantoj* de Eugen Kumičić kaj *Dianto de la tombo de poeto* (en traduko de Stanko Rukelj); www.fortunecity.com/westwood/indigo/453/nove kaj http:// 82.182.30.179/inko/096-1.pdf kaj http://82.182.30.179/inko/190-9.pdf

S. Rukelj

Zamenhof-Tago en Rijeka

Rijeka omaĝis al Zamenhof-Tago per programo en klubejo la 19-an de decembro 2005. Ĉefprelegis Vjekoslav Morankić.

VODNIKOVA 9
decembro 2005

Donacoj

121.Zlata Nanić	67,75 eŭrojn
122. Radenko Milošević	6,78 eŭrojn
123. Tihomir Lovrić	2,43 eŭrojn
124. Neven Kovačić	10,80 eŭrojn
125. Dinko Matković	27,10 eŭrojn
126. Bojana Duričić	2,00 eŭrojn
127. Zlatko Hinšt	50,00 eŭrojn
128. Roža Brletić-Višnjić	1,00eŭron
129. Mirjana Žeželj	13,62 eŭrojn

Entute: 10.283,52 eŭrojn

Zamenhof-Tago en Osijek

Esperanto-Societo *Liberiga Stelo* en Osijek okazigis la 15-an de decembron koncerton de kanzonistino Lada Kos kaj aktorino Lela Margitić. Ŝi kantis en Esperanto, franca kaj la kroata. Partnero en la koncerta programo omaĝe al Zamenhof-Tago estis Hotelo Central en Osijek, kies luksaj dekoraĵoj donis belan kadron al la jarfina festo. Esperantistoj kaj gastoj de la hotelo (entute 40 personoj) ĝuis la kanzonan koncerton de la elstaraj kantistinoj kian Osijek malofte spertis. Gratulojn al Saša Kocian, la ĉeforganizanto, kiu tiel bele dignigis Esperanton en Osijek. Pri la evento elsendis Kroata TV kaj Slavonia TV. La 6-minuta TV-filmo por Slavonia TV kun intervjuo de Davor Klobučar pri Esperanto disponeblas per KD.

Davor Klobučar.

PER RESTADO EN SARAJEVO PREMIITA KAJA FARSZKY

La komisiono de Esperanto-Societo "Bude Borjan" kunsidis la 29-an de decembro 2005 kaj analizis 3 aliĝojn de gejunulojkandidatoj por la senpaga restado ĉe IJK en Sarajevo.

La komisiono decidis, ke la plej altajn pritaksojn ricevas Kaja Farszky. Ŝia biografio aperos en la venonta numero de *Tempo*.

La sponsoro de tiu premio dediĉas la premion, restadon en Sarajevo, al la memoro pri siaj bosniaj radikaj, al la memoro pri paĉjo Jovan kaj al - kato Felikso.

Komisionanoj: *Bojana Duričić, Mirjana Žeželj, Spomenka Štimec.*

FAJREROJ DE L` INSULO

Rifoj kaj maro
pacaj najbaroj
dum martrankvil`

Blankan ŝaŭmon
ondoalvent`donacas
spasmo dolora.

Sur maro
nordvento kolektas pugnojn
por bati klifojn.

Ĉirkaŭ panpeco
mugiloj preĝas
Patron nian.

Fiŝarĝento
del`sal`kovrita
en bareleto.

Mugilsalto
dum nokta kalmo
lunluma kiso.

Sub figarbo
sur flava tuko
mortas aŭtuno.

Kaktopikiloj
hirtigis ŝtonojn
de l` ŝtonmuro.

Post vinberrikolto
forgesita vinbereto
kvazaŭ grapolo.

Vojoj ebriaj
de l` brandodoro
el kaldronego.

Narcisoj
aromebriaj
vintromeze.

Sur l` ŝel` de l` pino
gutoj rezinaj
nombras la jarojn.

Dinko Matković



KROATA VERKISTO DRAGUTIN TADIJANOVIĆ FARIĜIS CENTJARA

Dragutin Tadijanović, la kroata verkisto kies versojn esperantigis Josip Velebit kaj kiel propran eldonaĵon publikigis en 1936 sub la titolo *kanto al mia koro,* festis en 2005 sian centan jubileon. La tuta jaro 2005 estis en Kroatio dediĉita al la verkisto Tadijanović. Kiam li vizitis elementan lernejon Retkovec en Zagreb, kie Esperanto estas instruata, en la bonveniga programo salutis lin interalie lernanto Filip Valjak kiu recitis por la verkisto Esperantan tradukon de lia fama poemo *Longe dum nokt' dum vintra blanka nokt'.* Sur la foto: Tadijanović sur la kroata poŝtmarko.

UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO REKLAMAS PRI KROATA TURISMA ASOCIO

Ĉe Kroata Turisma Asocio aperis bela libro kiu prezentas kongresajn kapacitojn de Kroatio. Kun intereso juna membro de KEL Darko Blažić malkovris la libron en la turisma oficejo. Lian atenton altiris granda Esperanta flago en la mezo de la titolpaĝo. Pri kio temas?

La libro reklamas du turisme plej gravajn punkojn de Kroatio - tial titolpaĝe troviĝas Zagrebo kaj Dubrovnik. Sed la libro celas atentigi pri la kapabloj gastigi la plej grandajn mondajn kongresajn eventojn. Eble tial la malferma ceremonio de la zagreba UK akiris la honoran lokon sur la titolpaĝo. Ni kiel la ilo per kio aliaj reklamas pri si. Ĉu ankaŭ via partopreno helpis kunteksi tiun foton kun amaso da kongresanoj?

S. Štimec



NOVA FAKSILO EN NIA OFICEJO

Homoj tre gravas por ke la asocio funkciu. Sed ankaŭ la iloj helpas por ke la laboro ruliĝu glate. Jen la grava akiraĵo en nia oficejo el la jaro 2005: la nova faksilo. Dankon al la donacinto Davor Štimec.

Nova Zamenhof-objekto en Kroatio

BOŽIDAR VANČIK RICEVIS SIAN STRATON EN VARAŽDIN

Granda kroata Esperanta tradukisto kaj poeto Božidar Vančik ricevis en Varaždin sian straton.

Božidar Vančik (Kaniža 1909 - Varaždin 1970) estis juĝisto, anstataŭanto de ŝtata prokuroro, aŭtoro de lernolibro pri Esperanto laŭ kiu li ofte kaj multe instruis. Krom Esperanto lia granda hobio estis Intersteno.

Li multe tradukis el la kroata literaturo kaj literaturoj de aliaj sudslavaj popoloj. Lia plej fama traduko estas *Kavo* de Ivan Goran Kovačić. En poemaro *Reehoj,* publikigita sur Kanariaj Insuloj troviĝas 7 liaj pomeoj, el kiuj la plej fama estas *Al abortita ido.* Vančik reprezentas Kroation en pluraj antologioj de la originala Esperanta literaturo.

La strattabulon fotis Stanko Rukelj, la aktuala prezidanto de Esperanto-Societo en Varaždin kiu portas la nomon de Božidar Vančik.

La filo de Božidar Vančik donacis la esperantan bibliotekon de la patro al Kroata Esperanto-Ligo.

MINISTEMO PRI KULTURO HELPIS DISTRIBUI ZAMENHOF-STRATON EN LA KROATA

Kroata Esperanto-Ligo rekomendis al siaj membroj viziti lokan librovendejon kaj tie prunti kaj legi la libron ĉar Ministerio pri kulturo aĉetis de la eldonisto 50 ekzemplerojn de la libro por ke ĝi eniru publikajn bibliotekojn en Kroatio kaj estu je la dispono de legantaro dise tra Kroatio.

Se iu ŝatus aĉeti la kroatan libron, ĝi povas atingi aĉetonton . poŝte kontraŭ 125 kn. Vi povas mendi ĝin per telefono (01) 6112 576 aŭ per reto ĉe izvori@izvori.com. Pagebla ankaŭ per kreditkarto.

KROATA LITERATURA REVUO *MARULIĆ* PUBLIKIGIS POEMON DE NIKOLA ŠOP

Marulić- Kroata literatura revuo 2-2005 publikigis originalan kroatlingvan poemon de Nikola Šop *Preĝo ke ne plu mi estu poet'* alkompanata per la Esperanta traduko de Lucija Borčić kaj en la ĉina traduko de konata ĉina tradukisto Hu Guozhu. La ĉinigo estas frukto de la kongresaj renkontiĝoj en Pekino en 2004.

S. Štimec

ZAMENHOF-STRATO EN LA SLOVENA

Kiel anoncite en decembro 2005 aperis la slovena versio de *Zamenhof-Strato* de Roman Dobrzynski en traduko de Vinko Ošlak. Eldonis la libron Inter-Kulturo Maribor. La titolpaĝon de la libro priozorgis Zdravko Kokanović

FAMILIA RENKONTIĜO SUR LA MONTO KALNIK APUD KRIŽEVCI

La 4-an Familian renkontiĝon gastigos montkabana domo sur la monto Kalnik apud la urbeto Križevci en nordokcidenta Kroatio. La montkabano troviĝas tre proksime apud la plej alta pinto de monteto Kalnik - Vranilac (632), ruino de mezepoka kastelo kaj grandaj herbejoj taŭgaj por ripozo kaj amuzo de infanoj kaj gepatroj. Kiel kutime, la aranĝo estas dediĉita al esperantaj familioj kun Esperanto-parolantaj infanoj, sed ankaŭ aliaj estas bonvenaj.

Vanja Radovanović

KROATA STUDENTO PRI ESPERANTOLOGIO ĈE POLA UNIVERSITATO ADAM MICKIEWICZ

Konata zagreba esperantistino Juda Rey Hudeček ekstudis en Poznan ĉe Esperanto-Fako de la Universitato de Adam Mickiewicz, la dua plej granda universitato en Pollando. La postdiplomajn studojn kiuj daŭras 3 jarojn gvidas D-rino Ilona Koutny. La unuaj gestudentoj finis tie siajn studojn en 2002. Enkonduko al ĝenerala kaj aplikata lingvistiko, internacia kaj interkultura komunikado, gramatiko, literaturo kaj historio, estas nur kelkaj studobjektoj pri kiuj prelegos konataj esperantologoj. Studentoj studas hejme kaj veturas al Poznan por surlokaj kursoj de po 4 studobjektoj kaj ekzamenoj en septembro kaj februaro. La gestudentoj pretigas dimplomlaboraĵon kaj post la fina ekzameno ricevos atestilon pri Interlingvistikaj Studoj. ESF (Esperanto Studies Foundation) certigas kelkajn stipendiojn

PRELEGO PRI ESPERANTO EN KRAPINA

Radenko Milošević prelegis pri Esperanto en Kroatio kadre de la prelegserio de la asocio „Viroj kun la koro el Zagorje". Li gastis en urbo Krapina la 1-an de oktobro 2005. Lia temo estis "La latina hieraŭ - Esperanto hodiaŭ, en la batalo pri la kroata lingvo kaj Kroatio".

PRELEGO PRI ESPERANTO EN ZABOK

Spomenka Štimec prelegis en Gimnazio *Antun Gustav Matoš* en Zabok pri Esperanto al la gimnazianoj el la unua klaso la 4-an de novembro 2005.

KIE KROATIANOJ INTENCAS PARTOPRENI EN 2006?

KONGRESOJ KAJ KONFERENCOJ VIZITINDAJ

21a - 23a de aprilo: Montkabano sur Kalnik (apud Križevci)
La 4a Familia Montkabana Renkontiĝo.
Kontaktadreso rete: vanja.radovanovic@ericsson.com
Retpaĝo: http://www.angelfire.com/va2/Vanja.

23a - 30a de aprilo: Strasburgo, Francio
Kroataj lernejanoj ĉe Euroscola. Kontaktadreso: Kroata Esperanto-Ligo, Kneza Mislava 11, 10000 ZAGREB, telefono: 01 461 7550, faksilo: 01 4619373, rete: esperanto@zg.htnet.hr

6a - 12a de majo: Ŝanhajo, Ĉinio
La 58a Konferenco de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio. Kontaktadreso: IFEF-Kongreso, Istvan Gulyas, Rakos u. HU-1155 Budapest. Rete: kozsul3@freemail.hu, aŭ ĉe Kroata Fervojista Esperanto-Asocio, Mihanovićeva 12, HR-10000 Zagreb.

19a -21a de majo: Kostrena kaj Rijeka
Kroata konkurso pri scio de Esperanto por lemantoj el elementaj lernejoj. Kontaktadreso: ĉe KEL.

19a -21a de majo: Rijeka kaj Kostrena
Internacia junulara renkontiĝo pri temo: "Naciaj kulturoj kaj eŭropia identeco". Kontaktadreso: Esperanto-Societo Rijeka, Blaza Polića 2, HR-51000 RIJEKA, telefono/faksilo: 051 228 148, rete: esperanto.rijeka@ri.htnet.hr.

27an de majo: Hrašćina-Trgovišće
Meteorita festo. Kontaktadreso: ĉe KEL.

Junio (loko kaj dato anoncotaj)
La 8a Kongreso de Kroataj esperantistoj. Kontaktadreso: ĉe KEL.

22a - 24a de julio 2005: Hrašćina-Trgovišće, bieno de Spomenka Štimec
La 3a Renkontiĝo de Esperantlingvaj verkistoj. Kontaktadreso: ĉe KEL.

29a de julio - 5a de aŭgusto: Firenze, Italio
La 91a Universala Kongreso de Esperanto. Vidu aliloke en la revuo detalojn pri buskaravano de kroatiaj esperantistoj. Kontaktsdreso: ĉe KEL.

72a Internacia Kongreso de Blindaj esperantistoj. Informoj ĉe: Antun Kovač telefono: 01 487 0142 kaj poŝtelefono: 098 993 5712

5a -13a de aŭgusto: Sarajevo, Bosnio kaj Hercegovino
La 62-a Internacia Junulara Kongreso. Informoj rete: hara@ikso.net. Kontaktadreso: ĉe KEL.

6a - 12a de aŭgusto: Triesto, Italio
"Inter Karsto kaj Maro", internacia somera renkontiĝo en Triesto, Italio. Kontaktadreso ĉe: noredv@tele2.it.

19a - 26a de aŭgusto: Beograd, Serbio kaj Montenegro
/9-a SAT Kongreso. Inf: Terezija Kapista, Studentska 39/23 , SCG-11070-27 Beograd, Srbija **i** Crna Gora

21an - 24an de septembro: Dom pod Storzi, Slovenio
17a Montkabana Renkontiĝo. Kontakto: http://www.angelfire.com/vanja/index.html

19an de novembro: Kaštelir, bieno de Marcello Trampuh
Internacia esperantista renkontiĝo "Celebro de la nova vino". Kontaktadreso: Marcello Trampuh, Krančići 1, 52464 Kaštelir kaj rete: marcello@trampuh.com

En la mondo en 2006 okazos pli ol 160 kongresoj, konferencoj kaj renkontiĝoj kie sola laborlingvo estas Esperanto. Plena kalendaro de Esperanto-aranĝoj en la 2006 videblas ĉe retpaĝo: http://www.eventoj.hu.

Kompilis: V. Morankić

NOVA ADRESO DE INTERNACIA ESPERANT0-MUZE0

La Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno remalfermiĝis en Palaco Mollard, Herrengasse 9, 1010 Vieno.

KUNE jarkunvenis

Kroata unuiĝo de nevidantaj esperantistoj jarkunvenis en la ejoj de KEL la 26-an de novembro 2005. La kunsidon gvidis prezidanto Antun Kovač (meze) kun sekretario Dragan Štoković. Protokolis (dekstre) Damir Danilović.

KROATIO KAJ ESPERANTO

Antaŭ 48 jaroj okazis en Zagrebo la 38-a Universala Kongreso de Esperanto, kaj ĉijare, inter la 21-a kaj la 27-a okazas en Zagrebo la 86-a Universala Kongreso de Esperanto, kian ĉiujare oni okazigas en iu alia lando kaj en iu alia urbo. Ĝenerale estas konate, ke Esperanto estas la internacia planlingvo, kaj la okazigo de la Universala Kongreso en Zagrebo fare de ĝiaj uzantoj, sendube meritas ke oni dediĉu kontribuon en lingvokolumno de la gazeto *Vijenac*.

Kiam temas pri Esperanto, ne mankas diversaj antaŭjuĝoj. La unua kaj ankoraŭ sufiĉe disvastigita, estas ke Esperanto kiel la mondlingvo strebas anstataŭigi naciajn lingvojn kaj ekesti la nura lingvo de la tuta homaro. Nenio pli malproksima de la vero. Esperanto deziras ekesti la internacia lingvo, tio signifas la dua lingvo de ĉiu homo en ĉiuj internaciaj rilatoj, oficialaj kaj privataj. Ĝi strebas forigi la konkuradon por tiu funkcio de la tielnomataj mondlingvoj kaj ilian altrudadon al la "malgrandaj". Dirante alimaniere, Esperanto samtempe deziras en la lokaj kadroj konservi naciajn lingvojn, de kiuj ĉiutage multaj malaperas desur la monda lingvo-scenejo.

La dua antaŭjuĝo estas unuavide pli serioza. La multaj famaj realistoj diros ke Esperanto jam perdis la batalon kun la angla lingvo, kiu jam ekestis la vera mondlingvo. Ankaŭ tiu aserto estas malproksima de la realo. Veras ke la universala kleriĝo en la mondo progresas kaj ke, krome, oni pli multe lernas la fremdajn lingvojn, antaŭ ĉiuj la anglan, en multaj regionoj nur la anglan. Kaj ankaŭ estas vero ke la diversaj internaciaj rilatoj kaj la laboroj, specife tiuj de la malpliranga intelektnivelo, pli multe vastiĝas kaj ke la homoj por ili plej multe aŭ nure uzas la anglan lingvon. Sed la vero estas ankaŭ ke la angla ne nur pli kaj pli uziĝas, sed ĝi iĝas pli malriĉa, nefinlernita, reduktita, neegala angla lingvo. Kaj veras ankoraŭ unu fakto - en multaj landoj, precipe la aziaj kaj la afrikaj, la angla ĝis antaŭ nelonge antaŭe estis la nura lingvo de la moderna civilizo, de la landa administrado, de la mez- kaj alt- edukado, ktp., kaj nun tagon post la tagon tiun taskon ĝi pli perdas favore al lokaj lingvoj kiuj pli kaj pli obstine normiĝas kaj iom post iom en la socio prenas tiun lokon kiun hodiaŭ havas naciaj lingvoj en Eŭropo. Tiaj faktoj je la fino estos la decidantaj.

Ni rememoru pri la destino de la germana lingvo en Mezeŭropo. Iam la germana lingvo suverenis en la plej altaj instancoj, la altrangaj kaj oficistaj socitavoloj konis ĝin perfekte, kaj la naciaj lingvoj superregis nur la beletron, en la preĝejoj kaj en popolaj tekstoj. Hodiaŭ, pro la evolucio de la lerneja-sistemo kaj la turismo, nekompareble pli granda procento da homoj konas la germanan. Sed tiu germana lingvo estas uzata nekompareble malpli bone, maplimulte kaj rare dum la naciaj lingvoj transprenis preskaŭ ĉiujn ĝiajn iamajn taskojn.

Ne ekzistas iu pli serioza kialo por priprensi ke en la futuro la angla lingvo mondskale ne sekvos la destinon de la germana lingvo en Mezeŭropo. La malplifortigado de la ekskludigaj pozicioj de la angla lingvo en la plej multaj partoj de la mondo plifortigos la konkurencon de la aliaj pretendantoj por la pozicio de la internacia mondlingvo. Antaŭ ĉiuj fortiĝos la franca, hispana, araba, kaj certe rusa lingvoj. Tiam pli forte esprimiĝos iuj internaj malavantaĝoj kaj malfortecoj de la angla lingvo: malfacila akirado de la skribkapablo kaj prononcado, ĉiam pli grandaj prononcdiferencoj, kaj diferencoj en vorttrezoro, frazeologio, sed ankaŭ diferencoj pri la ortografio inter la brita, usona, aŭstrala kaj la aliaj variaĵoj de la angla normo. Neprecizeco kreskos. Ĉio tio signifas ke la batalo por la rolo de la internacia mondlingvo en la proksima futuro ne malfortiĝos, sed kontraŭe - ĝi fortiĝos.

La historio povas krome instrui nin ion alian. La angla ne estas la unua lingvo kiu en la siatempaj cirkonstancoj donis la impreson ke ĝi fariĝis la internacia mondlingvo kaj ke ĝi restos tia. Tia estis la greka en sia mondo, kaj ĝi perfekte plenumis la taskon. Sed anstataŭigis ĝin la latina kaj dum la jarcentoj ŝajnis ke restos tiel, tamen ĝin heredis la franca kaj ĝis antaŭ nelonge tenis la rolon, sed nun ĝi batalas por savi la restaĵojn de la iama brilo. Kio al ni garantias ke ĝuste la angla estos la escepto de tiu vicordo?

Ekzistas ankoraŭ unu kialo kial en la proksima futuro ne ekzistas espero ke iu ajn nacia lingvo vere venkos en la konkurado por la rolo de la reala intemacia mondlingvo. La kvanto de la normigitaj lingvoj kiel lingvo-portantoj de la nacia komunikado kaj civilizeco senĉese kreskas, en la mondo ripetiĝas la procezo kiu en la Eŭropo okazis plejparte dum la deknaŭa jarcento. Sed ankoraŭ nun eblas vivi sen la ĝenerala dua lingvo por ĉiu homo, sen universale akceptita internacia mondlingvo. Eŭropo jam estas Babilono, kaj ĝi estos tia pli kaj pli, sed la mondo kiel tutaĵo fariĝos Babilono kaj okazos iuspeca sufokiĝo. La averaĝa homo de la hodiaŭo ne vidas tion, sed ankaŭ la averaĝa Eŭropano de la komenco de la deknaŭa jarcento ne povis facile imagi la hodiaŭan eŭropan Babilonon. La vojaĝoj ĉiam iĝas pli frekventaj, longdaŭraj, kaj diversaj; tekniko, specife teknologio progresas, la medioj regas la mondon, ktp., ktp. Tio ne estas la terglobo kiu povus iamaniere vivi en la ĝeneralaj babilonaj kondiĉoj. Kaj ĝi serĉos urĝan eliron.

La homaro neniam ĝis nun faris ion kio estus dezirinda aŭ morala, la homaro ĉiam provas trovi iun pli facilan eliron kaj alportas la decidon nur tiam kiam tio absolute estas necese fari. Kiam ĝi devos fari tion, la homaro ekprenos la ĝeneralan internacian lingvon. Pro la propraj malavantaĝoj kaj pro la rezisto de la aliaj pretendantoj, neniu nacia lingvo havas tian ŝancon. Esperanto estos je la dispono, ĝi neniun endanĝerigas, kaj la homaro akceptos ĝin por la rolo pro kiu ĝi ekestis kaj evoluis jam dum 115 jaroj, de la jaro 1887-a ĝis hodiaŭ. Esperanto nek estos akceptita ĉar ĝiaj naturo kaj enhavo estas vere internaciaj, nek ĉar ĝi estas facila por lerni, nek ĉar ĝi estas unika kaj egalforma tra la tuta mondo, kaj simile (ĉio ĉi tio estas, interalie, la pura vero), sed ĝi estos akceptita ĉar ĝi praktike estos la sola je la dispono. Pro tio la plej ĉefa tasko de esperantistoj ne estas nur konvinki la homaron kiom saĝe kaj etike estus akcepti Esperanton kiel la internacian mondlingvon, ĉar la mondo estas surda al tiaj argumentoj. Sed la ĉefa senco de la Esperanto-movado estas en la monda kolektivo pluteni kaj evolui Esperanton kiel la vivan, homogenan, fruktodonan, kvalitan kaj elastan homan lingvon. Ĝis la epoko en kiu ĝi ne plu estos ofertata, sed serĉata. La Zagreba Kongreso estos unu paŝo sur tiu vojo.

Dalibor Brozović

Vijenac, n-ro 193-195, la 26-an de julio 2001

Esperantigis Danijela Drakula

DRAGUTIN WRANKA - ESPERANTO-KARIKATURISTO

Post iom da foliumado de malnovaj gazetoj, antaŭ mi troviĝis sufiĉe interesa rakonto. Rakonto pri homo, esperantisto, karikaturisto, pri liaj idealoj, pri liaj kapabloj, eĉ pri liaj eraroj.

Lia patro Pawel (poste Pavao), naskiĝis en Pollando (Robrek-Slezka, 1861). Li migris al urbo Osijek en Kroatio (tiam Jugoslavio), kie li fariĝis konstru-entreprenisto kaj lignokomercisto. Per obstina laboro li fariĝis unu el la plej riĉaj loĝantoj de Osijek, kie li posedis ok loĝdomojn. Li edziĝis al Helena naskita Stolić kun kiu li havis kvin infanojn: la filojn Dragutin (1904) kaj Miroslav (1916, veterinaro) kaj la filinojn Ana Franjka (1897, edziniĝinta Leitner), Marija (1901, edziniĝinta Graf), kaj Vjekoslava (1902, edziniĝinta Tajsl). Por nia rakonto gravas nur la filo Dragutin, kiu estis tre akvita esperantisto. Li naskiĝis en Osijek, la 30-an de septembro 1904

Al iom supraĵaj konantoj de la landa Esperanto-historio, la nomo de Dragutin Wranka estis konata el la jaroj antaŭ la dua mondmilito, kiam li obstine propagandis Esperanton en la regiono de Slavonio. Li estis kunaŭtoro (kun Lavoslav Kraus) de la tre popularа vortaro "4000 vortoj" (la unua eldono aperis en 1935 en Osijek),

Dragutin finis gimnazion en Osijek, post kio li ekstudis en Vieno, de kie li revenis ne fininte la studojn, kaj postenis kiel oficisto de distrikta tribunalo en Zupanja, kaj antaŭ tio en Brinje. Senpere antaŭ la milito li estis oficisto de la grundoficejo en Osijek. Ne estas klare pro kio li ne finis la studojn, sed ŝajnas, ke li, kiel filo de riĉa patro, vivis tre senzorge, kaj nur pro la decido de la gepatroj devis reveni kaj komenci labori. Tamen, tre verŝajnas la fakto, ke li lernis Esperanton ĝuste en Vieno. Pri tio indus serĉi informojn en la aŭstriaj arkivoj.

Li estis konata kiel tre lerta desegnisto, precipe karikaturisto, pro kio li komencis aperigi karikaturojn en nacilingva loka ĵurnalo "Hrvatski list" (hodiaŭ tre konata "Glas Slavonije"). En la jaro 1937 li edziĝis al flegistino de la urba hospitalo Serafina naskita Puratić (nask. en Sumartin sur la insulo Brač la 1-an de novembro 1909), kaj tio tre verŝajne havis gravajn konsekvencojn por lia posta vivo. La edzino de Dragutin estis fratino de policĉefo en Osijek en la periodo de kvislinga Sendependa Ŝtato Kroatio. Sub influo de la parencaj rilatoj, ankaŭ Dragutin akceptis politikan starpunkton favoran al la politiko de Sendependa Ŝtato Kroatio. Tiel, el tre fervora esperantisto en la 1930-1940-aj jaroj, kiam li per sia laborego faris fruktodonan terenon por fondo de Esperanto-societoj en Osijek, Belišće kaj Vinkovci, li subite fariĝis pli favora politikumanto, kaj post la nacia kongreso okazinta en Osijek en 1935 (kies LKK-ano li estis), li ne plu aperis publike rilate Esperanton.

Per alveno de la militfino, kaj per fiasko de la kvislinga ŝtato, do pro la politikaj kaŭzoj, kaj li kaj la edzino (kiu ankaŭ estis esperantistino) devis forlasi la hejmlandon. Sian novan loĝlokon ili trovis en Mendoza (urbo en Argentino, sur la deklivoj de Andoj). Per koincido, tiutempe en Argentino vivis ankaŭ Tibor Sekelj, kaj Dragutin Wranka kun li kaj aliaj diverslandaj enmigrintoj fondis en Mendoza tre akvitan Esperanto-grupon, dum jaroj disvastigante Esperanton en Argentino, ĉe kio Dragutin uzis sian kapablon de Csehinstruisto. Estas konataj liaj provoj propagandi Esperanton ankaŭ en aliaj sudamerikaj landoj. Malgraŭ miaj multaj provoj kontakti kun argentinaj esperantistoj, pri lia laboro tie mi ne sukcesis ekscii iom pli. Sed, en la internacia scenejo, Dragutin estis aparte konata per siaj lertaj karikaturoj en "La Praktiko", "Heroldo de Esperanto" kaj aliaj gazetoj de tiutempa Esperanto-movado. Ili estis plejparte primovadaj kaj pripolitikaj, kontraŭmilitaj k.s. Li apartenas al la plej konataj Esperanto-karikaturistoj entute. Li estis ankaŭ kapabla lingvouzanto, kaj el liaj literaturaj kreaĵoj konserviĝis la novelo "La recenzo" (aperinta en "Norda Prismo" n-ro 1 en 1958).

Li mortis en Mendoza la 21-an de februaro 1980.

Josip Pleadin

Geedzoj Dragutin kaj Serafina Wranka

- Bonan tagon, onklo Byrnes! Se vi min enlasos, vi vidos, kiel rapide solviĝos la problemoj!

Universala Esperanto-Asocio: "Vekiĝu, onklo, vekiĝu! Rigardu, ni kolektis jam 16 milionojn da subskriboj en la favoro de Esperanto!

Generalo Bastien, eksa prezidanto de Internacia Esperanto-Ligo: "Dank' al la ĝusta ĉevalo ni gajnis la vetkuron. Nun mi povas trankvile iri en prension."

LA RECENZO

Kurt Karamba fermis la Plenan Vortaron, metis la fontplumon sur la skribotablon kaj fluge tralegis sian recenzon. Elĉerpita li lokis sin pli posten, ke lia korpo plene laŭis la komfortan fotelon. Pro la modele plenumita tasko ekvibris rideto ĉirkaŭ lia, iom senesprima buŝo.

Per vetkura rapido la vespero pasis dum la laboro. Rigardo al la manhorloĝo montris, ke la tempo jam flugas renkonte al la noktomezo. Potenca oscedo sekvis. Kutime li tiuhore jam mole nestas ĉe sia edzineto, Sonja, sed hodiaŭ okazis io escepta pro la nobla devo informi la legantaron de unu el la plej gravaj Esperanto-gazetoj pri nova literatura evento. Ne estis la unua fojo, ke li kritikis dubevaloran libron, kiel ankaŭ la ĵus kritikita originala verketo. La temo, kiun lia konato, Jorge Parmezano prilaboris, ne plaĉis al li. Teda naivaĵo en lingvo neflua kaj perfekte fuŝa. Karamba ne dubis, ke Jorge Parmezano, kvankam faklerta ŝuisto, kiel verkisto ekster nia movado meritus nenian seriozan konsideron. La libro ankaŭ teknike ĝenis, sed la preseraroj estis malpleje ĝenaj, ĉar ili sprite interrompis la monotonecon de la teksto. En la antaŭparolo la kompostisto eĉ kripligis la nomon de Parmezano je Jorge Partizano, ĉar li ja estis liberema kompostisto kaj pensis pri la braveco de partizanoj, sed tio certe ĉagrenis la aŭtoron, kiu estis rigora vegetarano.

Tiu mensa manĝaĵo, kiun li devis digesti, asocie vekis la rememoron pri la kutima dispepsio. Plaŭda rukto revokis la iom tro abunde konsumitan brasiksalaton, tiel ke la du misdigestoj marŝis kune. Sian recenzon li tamen konsideris ne nur lingva, sed ankaŭ diplomata majstraĵo. Ĉu decus per sincera kaj negativa kritiko inciti ofereman pioniron, kiu elspezis por la eldono de sia verketo sian lastan moneron?

Li ne povis ne cedi al la tento refoje tralegi sian recenzon, sed laŭte, laŭ sia kutimo, por pli impresi. Li admiris sin. Kiel sentos do la samideanoj, por kiuj ĉio estos nova? Precipe la fino pri la bildoriĉaj esprimoj plaĉis al li kaj li ne povis ne voĉlegi: "En tiu originala verko la aŭtoro ne prilaboris ian naivaĵon, sed realisman temon kun poezia ĉarmo. Malgraŭ negravaj lingvaj kritikindaĵoj la verko estas rimarkinda kontribuo al nia originala literaturo. El ĉiu paĝo brilas frukto de verkista talento, majstra kaj kolorriĉa lingvaĵo. Jen ekfloris nova, krea talento en la ĝardeno de niaj literaturamantoj. Jen artisto, kiun la beletra Muzo kun ŝato vizitas kaj inspiras. Libro de tia unuaranga literatura merito estas ne nur leginda, sed ankaŭ legenda kaj nepre havenda."

Korpe kaj mense laca li iĝis. La palpebroj iĝis plumbopezaj, dum la kapo glitis posten. la horloĝo anoncis la noktomezon. La sonorbatoj preteris duonsvene liajn orelojn, ĉar lia menso jam ŝvebis en la lando de la sonĝoj. Recenzisto...! Nun la kapo jam dorme ripozis sur la dorsapogilo, la okulvitroj glitis sur la iom malaltetan frunton. Recenzisto ...!

Spasmaj movetoj subite aspergis lian vizaĝon. La beata mieno mallumiĝis, ĉar el la tero antaŭ li elsaltis verdkoloraj koboldoj kun sagoformaj harpunoj. Ronde ili ĉirkaŭdancis lin kun moka rikano: Hihihi, ha, ha, ha! Unu el ili neaverte kun aroga aŭdaco saltis antaŭ lin kaj per sia vosteto malhome vipis lian nazon. Kia malrespekto! La nazo ekdoloris. Li volis protesti kaj helpokrii -- Sonja –, sed vana gorĝostreĉo, io kunpremis la gorĝon, el kiu je lia surprizo eliĝis nur kvar prasonoj: Sal, Ber, Jon, Roŝ. Tio mirigis lin, ĉar la kvar vortoj memorigis lin pri la prasona teorio. Sed li mem ne estis certa pri tio, ke li fakte aŭdis tion, kaj la ĝustecon de la teorio ankoraŭ li ne povis pruvi. Eskapi li volis el tiu ĉi malamika regiono kaj provis jam kurocele levi la piedojn, sed en ia elasta pasto li gluiĝis. Nun la koboldoj puŝis-tiris lin al alia loko. Tie en fono stafeta torĉo ekflamis ruĝe kaj lumigis virinon en klasika greka robo sur trono. Karamba diris: "Aha, jen la belarta Muzo, la inspirantino." La muzo ne estis sola. Ŝin ĉirkaŭis grupo el konataj Esperanto-poetoj kaj verkistoj. Dekstre sur la brakapogilo duonsidis kalva, mefistoaspekta poeto kun bonkora rideto, ĉirkaŭita de siaj skolanoj. Aliflanke knabino kun siama kato formis ventron de alia grupo, pli juna. Fone staris Reto por kapti utilajn inspirojn kaj ideojn, kiuj ŝvebis kiel brilantaj nuboj en la spaco. Apude talenta brazila poeto en infanĝardeno rajdis sur lulĉevaleto, ĉar li ankoraŭ apartenas al la infana raso. La muzo salute bonvenigis sian malnovan Gaston veninta kun la nigra Rajmondo kun vinbotelo. Kavalira poeto etendis al la Muzo bukedon da rozoj, sed al Karamba minacis per urtikoj. Pro tiu malafabla gesto Karamba malkuraĝiĝis. Jen li sentis, ke li iĝis centro de ĝenerala atento. Lia komplekso de malplia valoro peris hontosenton. Li vidis sin duonnuda. Lia eluzita pantalono malkaŝis ne oportunajn ŝinkopartojn. La tumultemaj koboldoj nur pliigis la ĝenan situacion kaj henis petole: "Sal - Salo - - Ber - Bero ... Ho, Ho, Ho, Hi, Hi!" "For diabla grego kun via morda ironio!!" li volis ekkrii, kaj ŝirmocele levi la brakon, sed la brakoj paraliziĝis. Li povis nur pene iri, ĉar li sentis surhavi siajn hejmajn pantoflojn, en kiuj liaj plataj plandoj nur malfikse movis sin.

"Aŭdu Karamba!" Potenca voĉo kontralta travibris la muzejon. "Laŭ mia percepto la celo de la kritiko estas ne kaŝi la veron, sed diri ĝin sincere, lojale, honeste. Kaŝi la veron, prisilenti ion kritikindan, egalas al misinformo. Estu modesta kaj bridu estonte vian emon al superlativoj. Via ĝisnuna laboro sur la recenza kampo estis laŭ etika kaj estetika vidpunkto ne nur riproĉinda, sed frivole trompa al ĉiuj, kiuj kredis vin objektiva, nekoruptema. Farante tion vi malutilas ne nur al ni verkistoj, sed al nia afero ĝenerale."

"Certe, certe", li volis cedeme rediri, sed denove sufokiĝis la gorĝo. Nun okazis la plej malagrabla. La ĝis nun pacema siama kato salte leviĝis, de la brako poetina, saltis al li, al lia pantalono kaj ekgratis lian videblan ŝinkoparton, kvazaŭ ĝi estus arbokrusto. Fajre ekdoloris la sangantaj gratajoj, eklarmis la okuloj. Tamen longe ne daŭris tiu ĉi embarasa situacio, ĉar fine li aŭdis, ke ie koko krias jam kaj la sonĝo ĉesis. Karamba vekiĝis.

Nervotaŭzite li salte leviĝis el la fotelo. Diskrure li ekstaris antaŭ la skribotablo, dum ŝvitgutoj perlis sur lia lunvizaĝo, el kiu du timplenaj okuloj gapis en la malplenon. La membroj doloris, la kapo zumis, la stomako brulis. "Tamen mi devis ne manĝi brasiksalaton" li murmuris sinriproĉe. Subite ekregis lin nerezistebla korpa emo. Haste li ekprenis paperon kaj rapidis el la ĉambro kaj iom poste li revenis kun malpeziĝo kaj faciliĝo en la tuta korpo. Sed vane li serĉis la recenzon sur la tablo. Ĝi estis for. Ŝajne ĝi malaperis en iu sekreta servo ... nu estis tamen bone tiel. Li reekprenis la plumon kaj kun freŝa fervoro skribis novan recenzon, kiu estis objektiva, justa kaj tiel perfekte respegulis la veron.

Dragutin Wranka

PROPRAJ ELDONAĴOJ DE KEL

KROATA ESPERANTO-LIGO

Kneza Mislava 11
HR-10000 Zagreb
Tel. 00385(1)4617550
Fakso: 00385(1)4619373
esperanto@zg.t-com.hr
www.esperanto.hr





Feliĉan Kristnaskon! Bonan jaron 2006!